Nro 31 (2)

NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
☎: 944.16.44.92
🖳: tepgaitj@lg.ehu.es

E-kursoj: Lunde kaj Merkrede
Kunvenoj de la sociaro: Vendrede.
Estrar-kunvenoj: 1-a vendredo de ĉiu monato

Marto/Aprilo 1.998.

ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ.

Krom aliaj universitatoj, kie pasintjare oni instruis Esperanton oficiale (Provence-Saint Charles (Marseille - Francio), Eötvo (Budapest), Poznan (Polio), ...), ĉijare oni instruas la Internacian Lingvon ĉe:

- Jagelona Universitato de **Krakovo (Polio)**, kie daŭre estas deviga stud-objekto por tiuj (70 geestudentoj), kiuj elektis ĝin kiel parto de sia deviga programo.

- Universitato de **Salford (Britio)**, kie post plurmonata persvada kampanjo finfine estis akceptita propono pri oficiala E-kurso. Tiuj gestudentoj, kiuj studas ĝis diplomnivelo du fremdajn lingvojn, rajtas elekti, el pluraj ebloj, trian, komencan lingvon, kiun ili studas, entute, dum 90 horoj (tia estas Esperanto!). Grava parto de la kurso koncernas historiajn, sociajn kaj kulturajn aspektojn de la lingvo.


- Universitato de **Valencio (Hispanio)**, kies filologia fakultato funkciigas, ekde Marto ĉi-jare, "Baza kurso de Esperanto"-n, unuafoje en Hispanio kiel oficiala studobjekto. La kurso estis proponita ene de la tiel nomataj "Asignaturas de libre elección" (liber-vole elekteblaj studobjektoj) kaj havas akademian valoron de 2 "kreditoj" (20 horoj) por la gestudentoj. La instruisto estis **Augusto Casquero**. La sukceso estis tiel granda ke oni povis akcepti nur 60 partoprenantojn kaj oni devis tuj demeti ĉian propagandon; aliaj 50 homoj restis en atendo-listo por venonta kurso.

NE FORGESU KE NI KUNVENAS, ĈIUVENDREDE, DE LA 7-A KAJ DUONO ĜIS LA 9-A, KE ELEMENTA KURSO OKAZAS LA LUNDOJN KAJ KE LA 1-AN DIMANĈON DE ĈIU MONATO NI ESTAS EN LA "PLAZA NUEVA" DE BILBAO.

ESPERANTO EN INTERRETO - DAŬRA KRESKO.

Laŭ statistikoj de la revuo "Eventoj", nehaltigeble kreskas la kvanto de esperantistaj retuzantoj. Vi mem kompilu la tendencojn:

1-2-93. 310 adresoj de 219 personoj el 26 landoj,
67 landaj kaj lokaj organizoj / gazetoj kaj 18 internaciaj.
1-1-94. 528 adresoj de 364 personoj el 37 landoj (kresko: 145 personoj, t.e., 66%),
125 lokaj kaj landaj organizoj/gazetoj, kaj 28 internaciaj.
1-1-95. 688 adresoj de 485 personoj el 44 landoj (kresko 33%),
174 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj kaj 36 internaciaj.
1-1-96. 876 adresoj de 624 personoj el 50 landoj (kresko 28 %),
191 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj kaj 42 internaciaj.
1-1-97. 1255 adresoj de 959 personoj el 61 landoj (kresko 53%), 181 hejmpaĝoj,
265 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj kaj 55 internaciaj.
1-9-97. 1601 adresoj de 1203 personoj el 63 landoj (kresko, gis Septembro, 25%),
286 hejmpaĝoj, 332 landaj kaj lokaj organizoj/gazetoj kaj 61 internaciaj.



RETA NOVAĴ-FORUMO POR HISPANAJ ESPERANTISTOJ.

Laŭ propono de Sro. Darío Rodríguez, dum la Hispana Kongreso en Valladolid, la hispanaj esperantistoj uzos novaĵ-forumon en la reto (en la tiel nomataj, angle, "news"), kiu ĝis nun restis neokupita. La nomo de tiu forumo estas **alt.esperanto.principiantes** kaj oni uzos ĝin, precipe, por informi pri la diversaj E-aranĝoj okazontaj en nia lando; tamen, restas malfermita por kia ajn informo.

LA 1-AN DIMANĈON DE ĈIU MONATO NI ESTAS, MATENE, EN LA NOVA PLACO ("PLAZA NUEVA") DE BILBAO. VENU!

VORTAJ (A)LUDOJ.

Trovu la ĝustan difinon por ĉiu vorto.

(1) FLAGRI	(A) Balanceti
(2) VEGETI	(B) Puŝe delokigi
(3) GRINCI	(C) Froti per la ungoj
(4) FARTI	(C) Morti sufokiĝante en akvo
(5) HURLI	(D) Tuŝi per la lango
(6) RODI	(E) Subite rompiĝi pro interna premo
(7) ŜOVI	(F) Bleki sovaĝe
(8) GRATI	(G) Enstomakigi
(9) KREVI	(G) Ĉevalbleki
(10) DRONI	(H) Malobservi moralan leĝon
(11) GLUTI	(H) Vivi inerte
(12) RUKTI	(I) Stati sane
(13) LULI	(J) Tro laŭdi
(14) LEKI	(J) Intermite ekflami
(15) FLATI	(K) Eligi malagrablan frotsonon
(16) HENI	(L) Brue eligi stomakgasojn tra la buŝo
(17) PEKI	(M) Mordeti

SOLVOJ: 1-J; 2-H; 3-K; 4-I; 5-F; 6-M; 7-B; 8-C; 9-E; 10-C; 11-G; 12-L; 13-A; 14-D; 15-J; 16-G; 17-H.

VENONTAJ ESPERANTO-ARANĜOJ.

16/22 Maj. 1998. 50-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio). Aalborg
25/30 Jul. 1.998. 1-a Apud-Mara Kultura Esperanto-Semajno. Valencia. (Danio)
01/08 Aŭg. 1.998. 83-a Universala Kongreso de UEA. Montpelier (Francio)
03/10 Okt. 1.998. 6-a Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Calafell (Tarragona).
3-a semajno. Jul. 1999. Kongreso de Hispana E-Federacio. Castellón.
01/08 Aŭg. 1.999. 84-a Universala Kongreso de UEA. Berlin (Germanio).

COBRO DE CUOTAS.

El pasado 30 de Abril se pasaron al cobro, por la BBK, los recibos de aque-llos socios cuyo número de cuenta en dicha Caja de Ahorros figura en el Grupo. Todo aquél que, en años sucesivos, desee que le descontemos, directamente, el importe de su cuota de socio, de su libreta en la BBK, no tiene más que darnos el número.

☐ Por otra parte, quienes vean marcado el recuadro de la izquierda con "X", deben saber que es para recordarles que aun no han pagado la cuota de socio del presente año 1.988. Un pronto pago contribuiría a la buena marcha de nuestra Asociación.

Recordamos que la cuota normal es de **2.500 pts.** y, la reducida, de **2.000,** pudiéndose hacer el ingreso en nuestra cuenta corriente nº **22-1800155-0** de la **BBK.**

LASTE ...

De la 30-a de Aprilo ĝis la 3-a de Majo, okazis en Valladolid (Bajadolid) la ĉi-jara ***kongreso de H.E.F.*** (Hispana Esperanto-Federacio), en kiu partoprenis 6 esperantistoj de Bilbao. Spite de la malmultenombra partoprenado kaj de la fakta malĉeesto de eksterlandanoj, eblis ĝui, kiel ĉiam, la "koridorajn" babiladojn de malnovaj gekonatuloj kaj la rektan kontakton kun la plej kleraj hispanaj movadanoj.

Laŭ decido de la estraro, la ***venonta kongreso de H.E.F.*** okazos en la mediteranea urbo ***Castellón***, dum la ***3-a semajno de Julio 1.999-a***. S-ro. Conejero, membro de la L.K.K., informis en Valladolid ke loĝado en universitata restadejo estos ege malkosta kaj helpo de lokaj aŭtoritatuloj estas certa. En Aprilo estis inaŭgurita ***"Placo de la Esperanto"*** per malkovro de 2metra ŝtona monumento.

Dum la lasta ĝenerala kunveno de nia Asocio, okazinta la 27-an de Marto, oni decidis, interalie, ***redoni la tutan monon de la obligacioj***, al tiuj, kiuj aĉcetis ilin, ***la venontan 1-an de Oktobro***.La kialo estas ke la Grupo jam pagis ĉiujn siajn ŝuldojn kaj la redonenda mono, kiu "dormas" en "Invest-Fonduso", nuntempe liveras ridindan interezon.

Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de la granda hispana verkisto ***Federico García Lorca***, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kune kun Hispana Esperanto-Federacio, eldonis, ene de la librokolekto "Hispana Literaturo" (N-ro. 7-a), lian verkon ***"Sanga Nupto"***. Tradukis Miguel Fernández. 120 pagoj. 18 cm. Prezo: 10 gld. (raportis: Miguel G. Adúriz).

Grupo NIFO, eldonantoj de sciencfikciaj serioj, kiaj "Sferoj", "Orbito Nula" kaj "Future", havas TTT-paĝon ce la TTT-ejo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (www.ciudadfutura.com/esperanto). Nun vi trovos tie kovrilojn de la libroj kaj prelegon pri sciencfikcio kaj Esperanto. Estontece vi trovos ĉiujn novaĵojn pri novaj libroj kaj projektoj de la grupo NIFO. (raportis: Miguel G. Adúriz).

La estraro de UEA decidis nomumi, al ***Augusto Casquero, ĉefdelegiton de UEA en Hispanio***. Dum la lastaj jaroj, pro neekzisto ĉe ni de ĉefdelegito, la aferoj de UEA iom lamis en nia lando, la membraro malkreskis, ankaŭ la delegitaro, ... , varbado ankaŭ falis. Li petas nian kunlaboron kaj metas sin je la tuta dispono, unue, de la delegitoj, kaj, kompreneble, de la tuta hispana esperantistaro, ... , gravas havi junularajn delegitojn. (raportis: Augusto Casquero).
(Augusto Casquero de la Cruz. Avda. Burjasot, 29, A-31. 46009-VALENCIA.
a-casquero@redestb.es)